Somero 2007
Kajero 1

# Oni Diras Nun!

## Sendependa Gazeto de la Esperanto-Movado

http://revo.bierfaristo.com/onidirasnun/

### Einstein kaj Tolstoj Lernas E-on!

CAMPINAS

Post lastatempa seanco, mediumo Flavia WANDEL anoncis ke ŝi kontaktis la spiritojn de Albert EINSTEIN kaj Leo TOLSTOJ kaj ili ambaŭ decidis lerni Esperanton kaj nun studas en la pretermondo. Dum multaj jaroj, oni malprave diris ke Albert EINSTEIN subtenis Esperanton kaj false atribuis al li diraĵon de Leopold EINSTEIN kiu diris "Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo de internacia lingvo." Nun Albert konsentas.

**(Vidu "Lernas Esperanton je Paĝo 3)**

### Kabeintoj Timigas Komencantojn

DELHI -- s-ro C. A. DUPIN

Je la Tut-Monda Kongreso por Komencantoj en Barato ĉijare, multaj komencantoj esprimis timon pro la grandega nombro de kabeintoj. Ekzemple, fama kristano, s-ro Kristiano DRENO, lastatempe kabeis, kulpiginte la Esperanto-movadon pro dogmemeco, kaj nominte ĝin "kulton".

**(Vidu "Kabeintoj" je Paĝo 3)**

### Prezidentoj De Asocioj De Esperanto Starigas Komitaton Por Konsideri Eblecon Fari Ion

EULESS -- s-ro C. A. DUPIN

La onidiro ke prezidentoj de diversaj E-aj organizoj kaj asocioj starigis sekretan komitaton por konsideri la eblecon fari ion, ŝajne veras. S-ro Johano DEKLIVA konfirmis ke li estas membro de la komitato P.K.E.F.I. "Mi nur estas tie por certigi ke oni ne proponas ion danĝeran aŭ malsaĝan," diras s-ro DEKLIVA. Li donis al mi la nomojn de kelkaj altranguloj de diversaj landaj kaj tutmondaj asocioj, sed neniu el ili volonte pulbike konfirmis ke ili estas membro de la komitato.


Unu alia membro de la komitato priskribis la komitaton al mi malpublike, kondiĉe ke mi ne lin nomas. "Mi ne deziras ke miaj subtenantoj pensas ke mi faros ion...antaŭ ni havas unuaniman konsenton kaj aprobon." Verŝajne, tio estas la kialo por la sekreteco de la komitato.

"Nu, ni ĉiuj volas fari ion...sed ni ne deziras ŝoki la membrojn de niaj asocioj per agon, antaŭ ol la grundo estas fekunda..." li diris.

**(Vidu "Prezidentoj" je Paĝo 2)**

### Vizagxo de Zamenhof Sur Tostita Pano

SUDA BEND



Elias GOLFO miris kiam li faris tostitan panon kaj vidis vizaĝon en ĝi. Ofte oni trovas tostitan panon kiu montras aŭ la vizaĝon de Jesuo Kristo, la Virgulino, aŭ unu el diversaj sanktuloj, sed s-ro GOLFO vidis la vizaĝon de Felix Zamenhof, la frato de la aŭtoro de la Internacia Lingvo, Esperanto.

Felix Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko en 1868, kiam lia plej fama frato havis naŭ jarojn. Kelkaj el la gefratoj Zamenhof lernis Esperanton. Felix estis unu el la plej fruaj lernintoj de Esperanto eĉ en 1887.

Sub la pseudonomo FeZ, li pionire verkis poemojn kaj artikolojn en Esperanto kaj aktivis en la Esperanto Societo "Konkordo".

Elias, kiu ne parolas Esperanton, decidis vendi la tostitan panon per la retservo "eBay". Li ofertis ĝin al la monda esperantistaro, sed trifoje ĝi ne vendiĝis kiam ĝi ne sukcesis rikolti eĉ la minumuman monpeton de unu usona dolaro. Fakte, neniu ofertis pli ol 5 cendojn por ĝi kaj poste montriĝis ke eĉ tiun oferton faris Elias mem per ŝtrumpetmarioneta enskribiĝo.

"Damne ke la tostita pano ne havis la vizaĝon de Ludoviko mem," amare diris Elias telefone dum nia intervjuo. Li certas ke, se la vizaĝo de la "iniciatinto de Esperanto" estis aperinta tie, la panpeco valorus almenaŭ kelkajn dolarojn. ♣

## Poetino Enhospitaliĝas

ARKHAM -- C. A. Dupin

Elizabeth MONTCLAIRE (eLEZabed montKLER) de Novjorko, Novjorkio, Usono, fama pro ŝia originala poezio kaj tradukoj de Emily DICKINSON, Edna ST. VINCENT MILAY, kaj Ezra POUND, transiĝis de Danvers State Hospital al Arkham Azilo por Nesanigeblaj Frenezuloj. Nun la ŝarĝo de d-ro Henry WEST, ŝi estas diagnozita skizofrenio.

Bone konata pro ŝiaj tradukoj kaj afableco, multaj de ŝiaj amikoj ŝokiŝis ke la belulino, ankoraŭ en ŝia tridekjaroj, estas skizofreniulo.

"Estas vera ke ŝi ne prezentas la klasikajn simptomojn de skizofrenio," diris d-ro West, "kio estas la aŭdo de voĉoj, kutime timiganta kaj ofte nerezistebla. Sed ŝia malsaneco malpliboniĝas ĉiujare, kaj la aliaj simptomoj estas klara indiko de grava mensa malsaneco."

Al miaj demandoj, d-ro West daurigis, "Unue, ŝi nur sonĝis pri mondo en kiu delfenoj, balenoj, kaj korakoj parolas en komprenebla lingvo. Sed ŝiaj sonĝoj estas ege klaraj, akraj, kaj detalaj, kaj eĉ verŝajne daŭras pli longa ol ŝia vera dormo. Poste, ŝi komencis sonĝi pri mondo tie, kie la lernejoj por infanoj estas similaj belaj tiaj, kiaj oficejoj por negocistoj. Lastatempe, ŝi sonĝas pri mondo en kiu stadiomo estas uzato por prelegoj, kaj plejparto de la homaro ludas piedpilkon, anstataŭ spektas ĝin. Fine, ŝi sonĝis ke la tuta homaro esploros la stelojn kune kaj pace."

Mi demandis, "Do vi enhospitaligis ŝin pro ŝiaj optimismaj sonĝoj?"

"Ne," respondis d-ro WEST, "sed ĉar ŝi permesis siajn sonĝojn iĝi revojn, kaj siajn revojn efikis sian konduton. Ekzemple, ni malkovris ke ŝi sekrete planis elspezi sian heridaĵo per esploro komuniki kun korakoj kaj korvoj, kaj eĉ paseroj, kaj klare ŝi jam malŝparis multon da tempon pri ŝia poezio. Ankaŭ, ŝi silentas al niaj demandojn plu kaj plu, kaj respodis al ni tre malamike. Ofte, ŝi ekploras kiam ni pridemandas ŝin, aŭ kiam ŝi legas iom bagatelaĵon en ĵurnalo. ŝi ne povas distingi inter eblecon kaj maleblecon. Ekzemple, ŝi pensas ke baldaŭ homo flugos per sia propa forteco, aux per nur suna energio. Ŝi imagas ke oni povas flugi per svingado de flugilo, kiel angxelo. Cxi tio religia imagado klare indikas skizofrenio."

Ŝia patro, Milton Musgrave MONTCLAIRE, iome klarigis la aferon: "Arkham estas la plibona ejo por ŝi. Mi amas mian filinon, sed mi ne povas permesi ke ŝi malŝparu la riĉaĵojn amasigitajn dum jarcentoj de la Musgrave kaj Montclaire familioj por sensencaĵojn."

**(Vidu "Poetino" je Paĝo 3)**

## Letero al Redaktoro

## Edzperanto Estas Falsa Reklamo

CHICAGO -- Armand Legg


Mi ne povas kalkuli kiomfoje oni diris al mi ke "Esperanto oni nomu 'edzperanto'" pro la nombro de edziĝoj kiuj okazas pere de Esperantistaj geparoj. Mi diras ke tio estas falsa reklamo. Mi lernis Esperanton ĉar mi volis renkonti bonan knabinon por edziĝi. Mi studis zorge por eviti gramatikajn erarojn. Mi partoprenis lokajn, regionajn, landajn, kaj internaciajn kongresojn. Mi abonis diversajn revuojn. Bedaŭrinde, tamen, ĉio estis tute senefiko: En la 10 jaroj ekde kiam mi lernas, mi nur trovas partnerojn por anonima seksumado.

En Kubo, mi pasis tri noktoj kun tri malsamaj virinoj. En Rio, mi pasis semajnfinon kun virino kiu ŝatis sekumadi en la oceano antaŭ ĉiuj. En Romo, mi renkontis viron kiu ŝatis kuiri senveste -- kaj mi ne diros per kio li kirlis -- sed mi restis kun li dum nur unu semajno.

En Kalifornujo, mi iris al "senkrokodilada semajnfino" kaj post trinki ion mi memoris nenion ĝis poste mi vekiĝis en subetaĝo ligita al lito per silkaj ŝnuroj dum diversaj homoj instruis al mi pri akuzativo kaj seksaj ludiloj.

Se iu volus ĉiunokte seksumi kun malsamaj homoj, lernu Esperanton. Se iu ĉiam volus trovi la plej grandajn orĝiojn, Esperanto ja alportos vin al tio. Sed mi ŝajne neniam edziĝos per Esperanto, do laŭ mi oni ne plu nomu ĝin "Edzperanto". Laŭ mi, oni prave nomu ĝin "Seksperanto". ♣

## Prezidentoj



"Multaj de niaj membroj havas la anticipon, kreita per longa kutimo, ke ni faru nenion. Se ni farus ion nun, eble ni forpelos la plejparton de niaj ceteraj membroj---ni jam forpelis ilin, kiuj tro deziris agon, kaj ni ne povas riski ofendi la restantojn," diras mia anonima fonto.

Mi penis malkovri ĉu s-ro Renatto CORSETTI estis membro de la P.K.E.F.I. Mi ne trovas certan respondon---versajne la membroj mem ne estas certa pri la membraro. Sed s-ro DEKLIVA pridubigas la ideon. "S-ro CORESETTI estas iomete fama pro lia kutimo respondi al retpoŝtojn, eĉ de malaltranguloj kaj komencantoj. Li ne estas la speco de homo, kiu taŭgas por nia komitato. Sed certe, se ni decidas ion, ni permesu lin halti ĝin, per lia neaprobo. Ne troigu nian celon--ni nur *konsideras* agon." ♣

## Surloke!

### Esperanto Grupo en Champaign Illinois Sukcesas

URBANA

Champaign loĝanto Philip BREWER ĉeestis la semajnan renkontiĝon de la Esperanto-Klubo de Orient-Centra Ilinojo kiel la sola ĉeestanto je la oka sinsekva fojo.

"Ja estis alia ĉeestanto ĉe la unuaj du-tri renkontiĝoj. Tiam la alia membro ne plu ĉeestis. Ekde tiam, estas nur mi.



La grupo renkontiĝas ĉiun ĵaŭdon je 5:30 ptm, superetaĝe je la kafejo Espresso Royale.

"Unufojon, estis virino en la kafeo, kiu sciis tion, kio estas Esperanto," diris Brewer. "Ŝia patro instruis la lingvon! Bedaŭrinde, oni mortigis lin dum la dua mondmilito. Sed, mi tre agrable parolis kun ŝi, dum ŝi atendis la komencon de la loka franclingva kunparolado-grupo, kiu ankaŭ renkontiĝas ĵaŭde en la kafejo."

Brewer certas, ke pli da membroj ĉeestos somere. "Kelkaj estas studentoj, kaj estas kompreneble okupitaj dum la universitato-jaro. Kaj, se estos neniom dum la sumero, eble venontan aŭtunon, kiam la studentoj revenos." ♣

## Poetino

Mi ankaŭ havas revojn---mi revas de la tago kiam Dio revenas kaj inferigis la pekulojn, ekzemple---sed mi ne permesos ke ĉi tio min senrezonigas."

Al mia demando pri ŝia futuro, s-ro Montclaire diris, "Mia espero estas ke la bona doktoro povos trovi drogo kiu cxesis ŝiajn sonĝojn, kaj redonos al mi filino, kiun mi povas kompreni." ♣

## Kabeintoj

"Mi ne povas kompreni kiel la Esperanto movado ĉefe subtenas Esperanton, kiam fakte oni devas subteni ĉiun lingvon egale," diris s-ro DRENO. Ĉi tia logika formulo ekfajris multon de sinduba diskuto inter la komencantoj, kiuj nature emas subteni multlingvecon. S-ro DRENO daurigis sian atakon, "Kiel oni kiu kredas je Jesuo Kristo, la Reĝo de reĝoj, kiu mortis kaj sinlevis el la tombo, mi devas diri ke mi pensas ke la Esperanto-movado fakte estas kulto, kaj pli bone estu nomita Zamenhofismo. Kiel la falso religio de de Mohamedismo, la Zamenhofismuloj sekvas nedian, ne-miraklan ulon dogmeme, kaj deziras igi ĉiujn 'sampensi', kaj eĉ multe atakas la argumentojn de tiuj, kiuj ne samopinias."

Aliaj antaŭaj sampensantoj ankaŭ kabeis. Diris lastatempe diplomiĝinta Boĉjo MALLIGNA, "Unue, Esperanto estas ĉio, por kio mi povas esperi. Mi amikiĝis kun multaj inteligentaj, bonkoraj uloj. Fakte, mi trovis mian unuan dungon per kontakto de mia loka klubo. Plue, je mi unua kongreso, mi trovis kunamumanto, kiu estas ege malkutima por mi..." "Kompreneble," mi diris, "sed kial vi kabeas nun?" mi demandis. "Nu, nun mi jam havas dungon, kaj mi ne povas anticipi tian unikan novan karnecan sperton, do kion ofertas Esperanton al mi nun? Se mi ne akiras daŭran fluon de bonaj spertoj, kial mi malŝparu mian valoregan tempon pri ĝi?"

Tiaj malplaŭdoj multe imponis la komencantojn, ekzemple d-ro Saŝa MOLKAPA. "Kiam mi eksciis pri Esperanto, mi pensas ke ĝi estas unu de la plej noblaj, bonsencaj, kaj logikaj ideoj tiuj, kiujn mi iam ajn aŭdis. Nun ĝi ŝajnas dubinda al mi. Mi venas al internacia Esperanto-kongreso, kie ĉiu parolas la internacian lingvon, kaj mi tuj lernis ke multaj homoj, de ĉiu parto de la terglobo, kritikas ĝin, kaj eĉ malesperantiĝas. Kaj tre timas min, ke---imagu---tiom multaj malbonajn, eĉ fiajn, aferojn pri Esperanto mi eksciis ĉi tie, en nur la unua monato, ĝis mi ekstudis!" ♣

## Lernas Esperanton

Dum multaj jaroj, oni malprave diris ke Albert EINSTEIN subtenis Esperanton kaj false atribuis al li diraĵon de Leopold EINSTEIN kiu diris "Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo de internacia lingvo." Laŭ f-ino WANDEL, d-ro EINSTEIN diris ke li neniam eĉ konsideris ĝin dum sia vivo. "Kia stulta ideo," li diris. "Studi alian lingvon? Mi preferis uzi mian tempon por pinĉi la postaĵojn de kelnerinoj." Tolstoj akordis, "Mi ĉiam preferis seksumi ol studi."

En la pretermondo, tamen, ambaŭ trovas sin inter multaj homoj kiuj ne parolas siajn gepatrajn lingvojn kaj ekstudas Esperanton por interkompreniĝi. "Oni ĉiam diras ke la pretermondo estas paradiso," plendis Einstein. "Sed kiam vi vidas belan virinon kaj vi ne povas komprenigi ŝin pri kion vi volas fari, ŝajnas pli kiel infero."

Ambaŭ el ili nun sekvas la 10-leciona kurso por lerni Esperanton. "Mi tre volis uzi lernu.net," diris TOLSTOJ. "Sed la retkonekto ĉi tie ne estas sufiĉe fidinda. Nekredeble, ĉu? Teĥnologie, la pretermondo estas tre eksmoda. Vi sopiras iPhone kaj ni simple volas ne plu devas uzi la telefonon por retkonekti. Stultas." ♣

## Omaĝe al Bob "Odora" Smith Memoriga Klozeto




KALAMAZUO

La konatoj de Bob SMITH unuope solenigis novan seĝon por la necesejo ĉe la loka bibiloteko kie estas la lokaj kunvenoj de la Esperanto grupo omaĝe al sia forpasinta fondinto. S-ro SMITH fondis la grupon en 1972 kaj venadis fidele dum multaj jaroj. Homoj kiuj eniris la banĉambron post li donis al li la kromnomon "Odora".

"Private mi vokis lin 'Odoraĉa'," diris Tom JOHNSON. Kelkaj el la aliaj pinĉis la nazon kaj svingis la manon antaŭ la vizaĝo kiam ili memoris la unikan kapablon de s-ro SMITH. "Unue, mi kredis ke estis io mortinta en la biblioteko, sed tiam mi eniris la banĉambron kaj konstatis la fonton."

"Post la unua fojo, mi ne plu uzis la bibliotekan banĉambron" diris alia, kiu preferis resti anonima. "Mi simple entenis ĝin ĝis post la kunveno kaj mi povis iri aliloken. Unufoje, mi ne sukcesis kaj devis iri hejmen kun malsekaj pantalonoj. Sed eĉ tio estas pli bona ol eniri la banĉambron post tiam, kiam tiu ulo uzis ĝin."

La ŝildon oni presis per lasera-presilo kaj afiŝis sur la muro per glubendo. "La estroj de la biblioteko jam forŝiris kaj forĵetis ĝin kelkfoje, sed ili ne scias ke la ŝildo devenas de nia grupo," diris s-ro JOHNSON. "Ni diris al ili ke ĝi estas verkita en Ido do ili plendas al la idistoj." ♣

# Oni Diras Nun!

http://revo.bierfaristo.com/onidirasnun/

Oni Diras Nun estas malofta sendependa eldonaĵo de la usona Esperanto-movado. Ni pretas diri ĉion -- eĉ la veron, se necese -- pri la sekretaj vivoj de la plej famaj esperantistoj. La redaktoro bonvenigas viajn demandojn, leterojn, "onidirojn" kaj fotojn. Sendu al D-ro Istvan Bierfaristo; Redaktoro <bierfaristo@comcast.net>

Oni Diras Nun!
ATTN: D-ro Istvan Bierfaristo; Redaktoro
5 Fairfield Street
Amherst, MA 01002